pdf. iompostiom .net 012

internacia reta printebla gazeteto – kompostita el retaj fontoj – por sur la tablo en esperantaj medioj

Junule

Volontuloj serĉataj por "Ekkoni Esperanton en lernejo"

Mi denove metas ĉi tiun mesaĝon, ĉar ankoraŭ oni urĝe serĉas kandidaton!

La 10an de majo 2007, la projekto de la Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo kun la titolo "Ekkoni esperanton en lernejo", estis akceptita de la franca nacia agentejo por la Eŭropa Junulara Programo.

La Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo serĉas en EU-landoj taugajn kandidatojn inter 18 kaj 26 jaroj por tiu posteno de Europa Volontulo.

Amuze

Kreteno

- Johano, mi scias, ke vi diradas al ĉiuj, ke mi estas kreteno!
- Pardonu min, mi ne sciis, ke vi volus gardi la sekreton.

Kion vi bezonas

Profesoro parolas antaŭ publiko:
- Ĉiu homo ricevas jam ĉe sia naskiĝo tion, kion ĝi plej multe bezonas en la vivo.
Voĉo el publiko:
- Tio ne povas esti vero; ja en tiu kazo la homo devus naskiĝi kun plena monujo.

Redakcie

Konstato

Saluton al ĉiuj Esperantistoj (kaj aliideanoj) kiuj legas ĉi tiun mesaĝon,

Mi devas bedaŭrinde konstati ke interrete en raporto.info ankoraŭ tre malmulte oni raportas el la propra regiono pri la novaĵoj. Ju pli tio okazos, des pli bona iĝos ĉi tiu gazeteto kaj des pli regule ĝi povos aperi. Nun ĝi tagon ne estis pro manko de novaĵoj.

Cetere mi volas konigi mian intencon fojfoje, kaj eble eĉ ĉiufoje, publikigi ion de Idistoj. Mi vere malŝatas la disecon inter Esperantistoj kaj Idistoj, kaj eble kuna agado per ĉi tio pli proksimiĝas.

Samideane,

Joop Kiefte // LaPingvino

Ido-lingue

Jubilea Ido-renkontro 2007 eventos proxime a Paris

Prenita el la retejo novajeti.tk

Robert Pontnau e Frank Kasper dum la tempo inter la 13ma e 19ma di decembro 2006 renkontris en Paris pro prearanjar jubilea Ido-renkontro kun la aprobo dil ULI-prezidanto . Ni prearanjis renkontro dum la tempo inter venerdio, la 19ma di oktobro 2007 (arivo) e la 28ma di oktobro 2007 (maxim tarda departo) en la hotelo "Campanile" en Epinay sur Orge proxime a Paris. La labor-kunveni eventos dum la 20ma e 21ma di decembro, do dum saturdio e sundio. Dum la restanta sis dii til la maxim tarda departo ni aranjos totjorna exkursi. Dum la 24ma di oktobro ni projetas jubilea aranjo. Plusa informi vu trovas che www.ido.li/Idorenkontro2007.